

Antaŭparolo:

EES, kuraĝigante la disvolviĝon de novaj ideoj ekde 1949

Homoj ofte neglektas la gravecon de la rutino, konsiderante ĉiutagaĵojn enuaj. Tamen, dum oni babilas, ridas, suferas kaj laboras en sia ordinara vivo, oni lernas kaj ankaŭ elformas neordinarajn ideojn. Tiamaniere, antaŭ pli ol 130 jaroj, iu homo pensis pri kiel senkonflikte rilati kun siaj najbaroj. Rezulte de tiu ŝajne ordinara konsidero, kreiĝis Esperanto. Siavice, ĉi tiu lingvo – samkiel pluraj aliaj planlingvoj – provizis al homoj neatenditajn pensmanierojn, praktikojn kaj formojn de sinesprimo. Kompreni tiajn pensmanierojn kaj praktikojn – kaj videbligi tiajn klopodojn kompreni ilin – estas en la kerno de la ekzistado de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies (EES)*.

Ekde 1949, EES celas kunvenigi bibliografian korpuson pri temoj rilataj al Esperanto kaj al Interlingvistiko. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto. En ĝi ankaŭ aperas librorecenzoj, esploraj notoj kaj referaĵoj el la Esperantologiaj Konferencoj jare organizataj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Fondita de Paul Neergaard kaj poste redaktita de Christer Kiselman, EES troviĝas ekde 2019 sub la aŭspicio de CED. Tiu lastatempa ŝanĝo pri redaktado ankaŭ entenas ambiciajn projektojn pri ĝisdatigo kaj plibonigo de la revuo. Antaŭe parte gastigitaj rete de la Universitato de Uppsala, nun ĉiuj numeroj estas facile alireblaj kaj ĉiuj artikoloj estas unuope kaj senpage legeblaj en la nova retejo de CED. Plie, la longatempa kunlaboro inter CED kaj la eldonejo Mondial ebligas, ke la revuo estu daŭre disponebla kaj virtuale kaj papere, kun sia papera versio aĉetebla ĉe Mondial, UEA, Amazon kaj ĉiam pliaj virtualaj kaj fizikaj vendejoj.

Krome, EES fiere bonvenigas la novajn membrojn de sia Redakta Komitato: Kaori Nagai estas profesoro pri literaturo ĉe la Universitato de Kent (Britio) kaj fakas pri kosmopolitismo – temo pri kiu ŝi jam plurfoje esploris lige kun Esperanto. Klaus Schubert estas profesoro pri lingvistiko kaj tradukado ĉe la Universitato de Hildesheim (Germanio), kaj jam estas konata de esperantologoj pro sia laboro pri planlingvoj. Christopher Gledhill estas profesoro pri interkulturaj studoj ĉe la Universitato Paris Diderot (Francio), kadre de kiu li esploras pri frazeologio kaj tradukado, inkluzive de Esperanto.

La numero 2(10) de EES ankaŭ estas la unua kunredaktata de Humphrey Tonkin kaj Guilherme Fians.

Por plenigi la bezonon pri spaco kie fakuloj povu ellabori novajn argumentojn pri Esperantologio kaj Interlingvistiko, EES sin proponas kiel laboratorio. Ĉi tie, homoj el malsamaj fakoj, lingvaj fonoj kaj institucioj renkontiĝas por diskuti siajn ideojn kaj eksperimenti pri originalaj aliroj, teorioj, metodoj kaj esplorterenoj. Kiel skriba kunvenejo, EES bonvenigas ĉiujn seriozajn fakajn kaj interfakajn esplorojn pri temoj en la agadkampo de la revuo. Same, kiel laboratorio, ĝi provizas spacon kie aŭtoroj kaj redaktoroj, studentoj kaj profesoroj ĉiam pretas plulerni unu kun la aliaj, tiel ke niaj presitaj kaj virtualaj paĝoj estu kvazaŭ kundisolvejo pri ideoj.

Pro nia fokuso je originaleco kaj eksperimentado, ni instigas la Redaktan Komitaton kaj revizorojn ĉiam kuraĝige gvidi niajn kontribuantojn pri kiel pli klare kaj efike prezenti siajn eltrovojn kaj argumentojn. Laste, por ke EES realigu sian sindevontigon al plurlingveco en fakaj medioj, ni instigas niajn kontribuantojn daŭre disvolvi siajn ideojn kaj eventuale videbligi ilin ankaŭ en alilingvaj fakaj medioj, montrante kiel plurlingveco – same kiel interfakeco – gravas por la kunproduktado de valoraj formoj de kono.

Realigante tiajn celojn, ĉi tiu numero de EES kalkulas je tri esplorartikoloj kaj du esploraj notoj. La artikolo de Probal Dasgupta analizas la intensigan ripetigon de kelkaj sufiksoj en Esperanto. Demandante kial ‘problemeteto’ estas ebla Esperanto-vorto dum ‘vazlavejejo’ ne povas ekzisti, Dasgupta ellaboras argumentojn subtene al la strategi-ombra teoremo en morfologiaj studoj. Siavice, la kontribuo de Bengt-Arne Wickström proponas komparon inter spontanee disvolviĝintaj piĝinaj kaj kreolaj lingvoj (kiel tokpisino) kaj konscie planitaj lingvoj (kiel esperanto). Surbaze de ekonomikaj kriterioj pri optimuma strukturo de la lingvoj, Wickström esploras la gradon je kiu la rezultaj lingvaj strukturoj en ambaŭ situacioj similas. Gonçalo Neves, aliflanke, analizas la specifecojn kaj defiojn implikitajn en la verkado de la *Historia Vortaro de Esperanto*. Tiu ampleksa etimologia vortaro reliefigas kie kaj kiam apartaj vortoj kaj radikoj estis unue uzataj, kaj de kiu, funkciante kiel mapo de la fruaj jaroj de la evoluo de Esperanto.

Ĉi tiu numero de EES ankaŭ inkluzivas du esplorajn notojn – pli eksperimentajn kaj eseecajn kontribuojn kiuj starigas bazojn por pliaj esploroj. Unu el ili, de Ulrich Lins, analizas biografiajn aspektojn de la rilato de Detlev Blanke kun Esperanto. Dum homoj ofte rekonas Blanke kiel elstaran esperantologon kaj interlingviston, Lins emfazas la agadojn de Blanke ĉefe kiel movadano en kaj preter la Germana Demokratia Respubliko. Alia esplora noto, de Javier Alcalde, emfazas la kontribuon de Ana Velitchkova al la studo de la socia historio de Esperanto en meza kaj orienta Eŭropo. Alcalde analizas la disvolvon – kaj sekvan disfalon – de la Esperanto-movado en la

komunismaj landoj de Eŭropo dum la dua duono de la dudeka jarcento, montrante kiel Esperanto iam estis inter la plej influaj kaj internaciaj sociaj movadoj en tiu mondoparto.

Ni dankas la aŭtorojn kiuj provizis manuskriptojn por ĉi tiu revuonumero kaj kun kiuj ni interŝanĝis ideojn dum la eldon-procezo. Ni esperas ke la legantoj ĝuos *Esperantologio / Esperanto Studies* tiom kiom ni ĝuis kaj lernis dum ni redaktis ĝin. Fine, ni ankaŭ invitas vin kontribui al la estontaj numeroj de EES, tiel ke vi ankaŭ ludu aktivan rolon videbligante scian produktadon pri Esperantologio kaj Interlingvistiko ekster la bitaj limoj de sociaj retejoj, ekster la epistemologiaj muroj de niaj fakoj kaj ekster la limoj de niaj denaskaj lingvoj kaj de Esperanto mem.

Ĝuu la legadon!

Guilherme Fians
Humphrey Tonkin